

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Novembro / Decembro 1981



34. IFEF-Kongreß in Ungarn



Kongreßgebäude im Erholungsheim des Allgemeinen Versicherungsvereins
der Eisenbahner Ungarns

Survoje al Balatonfüred

Rapide alproksimiĝas la 34a IFEF-kongreso kiu kiel jam menciite okazos de la 1a ĝis la 8a de Majo 1982 en Balatonfüred apud la Balaton-lago (Hungario). Inter-tempe la aliĝiloj estas disponeblaj pere de la distriktaj komisiitoj. Krome la Internacia Fervojisto publikigis detalojn. Tial la sekvaj alineoj enhavas precipe aktualajn informojn kaj priskribojn de la ekskursaj celoj. GEFA iniste petas ĉiujn interesulojn aliĝi eble plej baldaŭ kaj ankaŭ decidi pri la partopreno al la dutaga postkongreso en

Budapest (8./9.5.). Sendube niaj hungaraj gekolegoj klopodos kontentigi vin rilate al eventualaj tranoktoj en Budapest. Tamen volu konsideri, ke pro la festotago (1.5.) iliaj ebloj estos limigataj.

Ĉiukaze Hungario kaj precipe la fervojista kongreso meritas vian intereson. Multaj gekolegoj el socialistaj landoj, kiuj ne povis ĉeesti en Regensburg, venos al Balatonfüred por revidi siajn geamikojn el Germanio. Ĉu vi estas unu el ili?

W. B.

34. Internationaler Kongreß der Eisenbahner- Esperantisten in Balatonfüred (Ungarn) vom 1. bis 8. Mai 1982

Anmeldung, Visum, Zahlungsmittel, Unterbringung

Siehe BULTENO 4/1981

Anreise

Die Kongreßteilnehmer können in Balatonfüred bereits am Samstag, den 1. Mai, aber auch am Sonntag, den 2. Mai, ein-treffen, da erst an diesem Tag das eigentliche Programm beginnt.

Wer in Wien übernachten möchte, benutzt zweckmäßig den IC 183 (Prinz Eugen), Hamburg Hbf ab 9.30 Uhr, Wien Westbf an 21.25 Uhr, bzw. den D 221, Köln Hbf ab 7.27 Uhr, Wien Westbf an 19.10 Uhr. Die Weiterfahrt nach Budapest ist an diesem Abend nicht mehr möglich.

Wer die Nachtfahrt vorzieht, nehme den D 223 (Holland-Wien-Expreß), Köln Hbf ab 18.25 Uhr, Wien Westbf an 6.40 Uhr. Weiterfahrt ab Wien Süd, das nur mit städtischen Verkehrsmitteln in 50 Minuten zu erreichen ist, um 7.35 Uhr, Budapest Keleti pu (Ostbf) an 11.35 Uhr. Günstiger ist der D 225 (Oostende-Wien-Expreß), Köln Hbf ab 21.35 Uhr, Wien Westbf an 9.45 Uhr, Weiterfahrt von dort (!) um 10.10 Uhr, Budapest Keleti pu an 14.35 Uhr.

Der letzte Teil der Anreise beginnt in Budapest Déli pu (Südbf), der mit der preiswerten U-Bahn (1 Forint) in 30 Minuten zu erreichen ist. Abfahrt um 12.45 bzw. 15.10 Uhr, Ankunft in Balatonfüred um 15.18 Uhr bzw. 17.49 Uhr. Die im BULTENO 4/1981 angegebene Verbindung, die Budapest umfährt, besteht nicht im Mai.

Informationsmaterial

Informationsmaterial kann außer bei der IBUSZ-Vertretung in Frankfurt auch bei folgender Anschrift angefordert werden: IBUSZ, Ungarisches Reisebüro und Handelsgesellschaft, Mauritiussteinweg 114/16, 5000Köln (Tel. 02 21 — 21 91 02 und 21 91 03). Jedes dieser Reisebüros verfügt über Bettenkontingente in Budapest, auch in Hotels mittlerer Preislage, die an Ort und Stelle von den Kongreßteil-nehmern gegen Barzahlung in DM ge-bucht werden können, wenn sie auf der Hin- und Rückreise in Budapest über-nachten möchten.

Ausflüge

Ganztägiger Ausflug A

(Kosten etwa 21,— DM)

Die Busfahrt führt zunächst nach Keszthely, 45 km von Balatonfüred entfernt. Der Ort liegt ebenfalls am Plattensee. Das bedeutendste Gebäude ist das Schloß Festetics, dessen Bibliothek über Raritäten von einzigartigem Wert verfügt. Das Balaton-Museum stellt mit seiner Sammlung die Pflanzen- und Tierwelt des Seengebietes vor. In der Nähe liegt der Badeort Hévíz, berühmt durch seinen großen Thermalsee, dessen Wasserwärme schon im Frühjahr mehr als 30° C. beträgt. Das Thermal-wasser wird vor allem bei Gelenk-erkrankungen angewandt.

Halbtagsausflug B

(Kosten etwa 13,— DM)

Unweit von Balatonfüred ragt die Halbinsel

Tihany mit dem gleichnamigen alten Fischerdorf weit in den Plattensee hinein. In der barocken Abteikirche mit romanischer Krypta finden weit beachtete Orgelkonzerte statt. Die weitere Fahrt führt nach dem nördlich gelegenen Knotenpunkt Veszprém und Herend, wo voraussichtlich ein Porzellanmuseum besichtigt wird.

Halbtagesausflug C

(Kosten etwa 10,— DM)

Der Zielort ist noch nicht bekanntgegeben. Bei diesem Ausflug werden die Teilnehmer mit einer köstlichen Weinprobe verwöhnt, die man sich keinesfalls entgehen lassen sollte.

25a GEFA-jarkunveno en Offenbach (Main)

Kiel anoncite en BULTENO 4/81 la jarkunveno de la Germana Esperanta Fervoja Asocio (GEFA) estas aranĝita ne por ĉiuj membroj, sed ĝi okazis esceptokaze en formo de laborkunsido de la estraro kun la distrikta komisiito de la 10a ĝis la 12a de Oktobro 1981 en Offenbach (Main).

S-ino Kruse estis bone preparinta ĉion malgraŭ sia apenaŭ superita malsano. Vendredon vespere la urbestro akceptis la delegitojn en la moderna urbodomo. En sia bonveniga alparolo li esprimis sian simpaton por la celoj de la Internacia Lingvo. GEFA-prezidanto Gießner transdonis donacon kaj informis la urbestron pri la nuntempa situacio. La vesperon oni pasigis en la agrabla Kolping-domo. Nomo de la Germana Esperanto-Asocio (GEA) s-ro Gießner distingis s-inon Kruse per meritkrucito de GEA.

Dum sabato matene la akompanantaj edzinoj vizitis la urbon, la delegitoj dediĉis al la abunda laborprogramo. (Vidu ankaŭ la apartan raporton pri la lastjara periodo kaj la emeritula renkontiĝo en Münster (Westf) la 5an de Septembro.) Traktitaj estas ankaŭ la venontjara 34a IFEF-kongreso en Hungario kaj la Internacia Skisemajno. La 26a jarkunveno de GEFA okazos de la 15a ĝis 17a de Oktobro 1982 en Friedberg (Hessen) kaj la 27a jarkunveno verŝajne en loko de la distrikto Hamburg.

Post la komuna tagmanĝo komforta aŭtobuso atendis la delegitojn kaj gastejojn por ekskurso al la Spessart-montaro.

Schiffsrundfahrt D

(Kosten etwa 7,— DM)

Während der dreistündigen Rundfahrt erhalten die Teilnehmer einen umfassenden Überblick über die am Plattensee gelegenen Orte mit ihren zahllosen Hotels, Sommerhäuschen und Campingplätzen. Es gibt allein 32 Orte, deren Namen mit Balaton beginnen.

Nachkongreß

Für alle, die das derzeitige Budapest nicht kennen, bietet sich am 8. und 9. Mai eine empfehlenswerte Gelegenheit, eine der schönsten Metropolen der Welt kennenzulernen. Weitere Einzelheiten über die Anmeldeformalitäten werden im Internacia Fervoja Asocio bekanntgegeben. W. B.

Celo estis la romantika kastelo Mespelbrunn loĝigita ankoraŭ de grafa familio. Kun multnombraj aliaj vizitantoj oni rigardis la vidindaĵajn salonojn kun iliaj preciozaj eksponaĵoj. En apuda kafejo la ekskursantoj ĝuis kafon kaj torton, bedaŭrinde dum forta pluvo. Reveturinte oni pasigis denove la vesperon en la Kolping-domo, kie eĉ bonega muzikisto stimulis al dancado ĝis noktmezo.

La dimanĉa matineo konsistis el prelego de s-ino Kruse pri la verko de Kolping, el sonfilmo de s-ro Barnickel pri la 33a IFEF-kongreso kaj el pritrakto de la restintaj organizaj kaj verbaj problemoj. Post komuna tagmanĝo oni adiaŭis, ne sen danki tutkore al la fidelaj kunlaborantoj kaj precipe al la organizinta s-ino Kruse.

En Decembro aperos

La verda relo

originala kaj traduka krestomatia Eldonejco: Literatura Foiro, La Chaux-de-Fonds, Svisio

56 paĝoj, formato A 5, broŝurita, prezo 15 GM inkl. sendkostojn La krestomatia enhavas la kontribuaĵojn el la

Literatura Konkurso

de la 33a IFEF-Kongreso Regensburg

Bv. mendi ĉe s-ino Elfriede Kruse, Wiener Str. 121, D-6000 Frankfurt/Main 70 Samtempe ĝiru la monon al la Sparda-Bank Frankfurt en ties poŝtĉekkonton n-ro 569 08 Frankfurt favore al Elfriede Kruse, konto 129 957

Lied im Advent von Hermann Claudius

Ĉiam kandelo pli
en kron', plektita kaj bela,
ke ĝi lumu por ni
tra tempo malhela.
Du kaj tri, poste kvar!
Lumas sur l' kron' la brileto!
Lumas ankaŭ homar...
Lumas nia ĉambreto!
Kaj eĉ lumas la ter',
festas la sanktnoktan venon.
Vi, en la koro esper',
sentas la benon.

Immer ein Lichtlein mehr
im Kranze, den wir gewunden,
daß er leuchte uns sehr
durch die dunkelen Stunden.
Zwei und drei und dann vier!
Rund um den Kranz, welch ein Schimmer!
Und so leuchten auch wir...
Und so leuchtet das Zimmer!
Und so leuchtet die Welt
langsam der Weihnacht entgegen.
Und der in Händen sie hält,
weiß um den Segen.

trad. Joachim Gießner



Jarraporto pri la periodo de la 24a ĝis la 25a jarkunveno (1980/81)

Enkonduko: En nia pasintjara raporto ni koncize priskribis la 70jaran pasintecon de GEFA. La cirkonstancoj kaŭzis, ke la komencanta 8a jardeko postulis de GEFA majstri grandan taskon: la organizadon de la 33a IFEF-kongreso. Ĝi influis nian laboron dum la tuta jaro. Sekve ankaŭ tiu ĉi raporto ne povas preterlasi ĝin. Ni tamen sekvu la kutiman skemon, por povi kompari de jaro al jaro.

Komence kun funebro ni denove devas konatigi la nomojn de 8 membroj, kiuj devis forlasi nin por ĉiam. Estis

Werner Sturm	Majo 1980
Reinhold Schmidt	19. 9. 81
Anton Weber	3. 2. 81
Heinrich Bolte	30. 6. 81
Emil Kauffer	12. 7. 81
Johann Thelen	12. 7. 81
Peter Hermanns	15. 7. 81
Siegfried Moser	29. 7. 81

Ili havu eternan ripozon.

1. Organizaj aferoj

1.1 Membrostato

GEFA pagis al IFEF por 819 individuaj kaj korporativaj membroj. Tio donis al ni la rajton je 5 komitatoj denove. Komence de 1981 ni havis 495 individuajn membrojn (498 komence de 1980). El tiu ekkoneblas, ke jam denove la membroperdoj superas la nombron de novaj adeptoj, alivorte, ke la rezulto de la varbakampanjo 1979 jam estas „formanĝita“.

Sed kun kontento oni povas konstati, ke unuopuloj ankaŭ ĉi-jare sukcesis allogi novajn anojn al GEFA. Al ili ni aparte dankas. Ni tamen ripetu frazoon lastjaran: „Ni devos klopodi, eĉ klopodegi, por inversigi la tendencon“! Neniel la kotizo povas esti malhelpaĵo, ĉar la vere ridinde malalta sumo de 1 marko monate por neniu povas esti kaŭzo ne aliĝi al GEFA.

1.2 Kunlaborantoj

Ĉi-foje ni ne bezonas raporti pri ŝanĝoj. La laborkonsilantaro kunvenis dufoje kun la distrikt-komisiitoj kaj kun la komisiitoj por specialaj taskoj, nome en Oberkirch kaj komence de Aprilo en Frankfurt. Kiel ĉiam abundaj tagordoj estis traktitaj.

1.3 Kursoj

La nombro de la kursoj daŭre estas tro malalta. Ĉiujare komenciĝas 6 ĝis 8 kursoj, sed kiel fino restas mezgrade 20 personoj. Teorie tiuj kursanoj devus fariĝi novaj membroj, kio eĉ sufiĉus por malrapide kreskigi la asocion. Teorie devus aldoniĝi kelkaj personoj, kiuj partoprenis en perkorespondaj kursoj. Sed kie restas tiuj lernintoj? Demando, kiun ni jam ofte starigis, senrezulte evidente. Bonvolu helpi, ke ĝi fariĝos pozitiva.

2. Kunlaboro en IFEF

La 33a IFEF-kongreso okazis en Regensburg la 15an ĝis la 21an de Majo

1981 kun 515 aliĝintoj el 18 landoj. Ni transprenis la organizadon laŭ peto de l' BSW-ĉefestraro en la Ĝenerala Asambleo de la FISAIC Septembro 1978. Sekve la preparoj — ĉefe elekto de kongresloko kaj luado de kongresejo — komenciĝis en Januaro 1979. LKK Regensburg fondiĝis la 14an de Julio 1979. Ĝi konsistis el 7 personoj, nome J. Gießner (prez.), W. Graß (vicprez. kaj kasisto), E. Kruse (sekr.), V. Röder (ekskursoj), W. Barnickel (informado), J. Schrapp (loĝigo), Joh. Müller (ĝeneralaĵoj). Por malaltigi la elspezojn, la plenkunsido de LKK kelkfoje okazis lige al la kutimaj labor-kunsidoj de GEFA. Entute okazis 6 plenkunsidoj kaj 13 kunvenoj resp. vizitoj en Regensburg kaj aliaj urboj.

Spite al la promeso de la urba trafik-oficejo, ke ne estos malfacilaĵoj pro la loĝigo, antaŭ la kongreso montriĝis, ke kelkaj hoteloj kaŭzis komplikaĵojn, ankaŭ ĉar anstataŭ la kalkulitaj 400 kongresanoj aliĝis 515. Fine tamen ni sukcesis ordigi ĉion. La aliĝiloj kaj kongresaj glumarkoj estis haveblaj jam en la 32a kongreso en America. La markoj prezentis la kongres-emblemon en 3 koloroj. Ĝi ankaŭ ornamis la bele presitan kongres-libron formato A5. Okaze de la kongreso GEFA havigis al si novan flagon, kiu taŭgas bone por ornami kunvenejojn kaj scenejojn. Same laŭ nia propono la FISAIC kreis por si novan flagon, kiu havis sian premieron antaŭ nia kongresejo apud la Esperanto-flago.

Krom la kutimaj programeroj menciindas jenaj novaĵoj: Nomigo de la salonoj per nomoj de iamaj aktivuloj de nia faka movado, tutsemajna sendstacio de la FIRAC-radioamatoroj, uniformprezentado (ĝis nun nur en Fulda 1967) el 13 landoj, informstano en la urbo, literatura konkurso, kasetoj en la aŭtobusoj por kunkanti. Kompreneble funkciis gazetara servo kaj speciala poŝtofiĉejo kun stampilo, ekspozicio kaj librostano, krome lingvo-instruado kaj ekzamenoj. La raporton pri la kongreso vi trovas en Bulteno 3/81. La tekston de la fakprelego („trajno sen radoj“), sin direktanta al estonteco ni disponigis al la Dokumenta Servo de la DB. La fakprelega kunsido montris novajn trajtojn.

La Terminara Komisiono prezentis gravajn rezultojn de sia lastjara laboro (komp. la resp. raportoj). La valora kunlaboro

de Hartig kaj Ritterspach en tiu gremio daŭre donas gravajn impulsojn.

Jen la momento, ke ni ankoraŭfoje danku al la BSW-instancoj pro ilia multflanka helpo, tutprecipe al la distriktestraro en Nürnberg, al la LKK-anoj, kiuj dum longa tempo eltenis la ŝarĝojn, kiujn alportas preparado kaj okazigo de tia kongreso, al la helpintoj, kiuj multnombre sin anoncis kaj konsiderinde kontribuis al la bona impreso de tiu manifestacio, al la aktoroj, kaj al la sorĉisto Trixini, al kiuj ni dankas neforgeseblajn kulminojn.

Eble ĉi tie taŭgas citi la finvortojn el la kongresraporteto en „Internacia Fervojisto“ p. 39: „515 partoprenantoj el 18 landoj ĝuis tiun sukcesplenan harmonion inter la kongres-aranĝoj kaj la lando, kiu gastigis nin. Ŝajnas vere, ke la organizintoj atingis la ĝustan punkton, kie la kutimaj kritikoj ne plu multe valoras.“

3. Kontaktoj, aranĝoj

De la 10a ĝis la 12a de Oktobro 1980 okazis la 24a jarkunveno en Oberkirch kun 116 partoprenantoj, inter ili 32 eksterlandanoj el 6 landoj. Samtempe ni povis festi tute modeste per kelkaj memoraj vortoj la 70an naskiĝtagon de nia germana faka movado (2. 10. 1910 en Elberfeld). Kultura kulmino estis la teatraĵo „Malfermu la pordon“, ludita de niaj polaj geamikoj K. Pienkiewicz kaj Z. Dobrzynski.

Kompreneble, eĉ memkompreneble okazis multnombraj kontaktoj trans ĉiujn limojn, fakto, pri kiu esperantistoj apenaŭ parolas. Kelkaj membroj vizitis la IFEF-skisemajnon en Bohinj (YU) kaj partoprenis eĉ kelkaj en la UK Brasilia.

La kontaktoj al BSW kaj GEA restis bonaj. La 33a kaŭzis plifortigitajn rilatojn al la tri gravaj sindikatoj, kiuj grandanime subtenis nin kaj kies gvidantoj persone salutis en Regensburg en Esperanto.

4. Informado

„Bulteno“ aperis 5foje (n-ro 5/80 ĝis 4/81) kun entute 38 paĝoj kaj 14 bildoj. La redaktoro povus aperigi kelkajn paĝojn pli, se li ricevus pli da kontribuadoj. Estas multaj inter ni, kiuj kapablas verki aŭ traduki interesaĵojn. Kuraĝu!

En DB-Amtsblatt ni povis registri 13 publikigaĵojn, en la taga gazetaro

57 artikolojn pri nia agado. La kongreso eĉ instigis la entreprenan organon „Wir“ objektive raporti pri ĝi. Pri la kongreso Regensburg aperis ĝis nun 131 publikigaĵoj,

el ili en nacia lingvo	
antaŭ la Kongreso	15
el ili en Esperanto	
antaŭ la Kongreso	61
el ili en nacia lingvo	
dum kaj post la Kongreso	18
el ili en Esperanto	
dum kaj post la Kongreso	37

presis 5 000 flugfoliojn, kies tekston ni estis parte transprenintaj el por junulara folio kaj adaptintaj al niaj cirkonstancoj. 2.000 el tiu kvanto la sindikato mem distribuis interne.

5. Emerituloj

Pro malsano de E. Kruse ĉi-foje gvidis J. Schrapp la renkontiĝon de la emerituloj la 5an de Septembro en Münster. Partoprenis 37 personoj. Laŭ ĝenerala deziro ni planas ankaŭ venontjare organizi tian renkontiĝon.

En Septembro 1981 la sindikato GdED

kompilis Joachim Gießner

Jahresbericht (Auszug) über den Zeitraum von der 24. bis zur 25. Jahresversammlung (1980/81)

Vorbemerkung: Im vorjährigen Bericht hatten wir die 70jährige Vergangenheit unserer Vereinigung gestreift. Der Beginn des 8. Jahrzehnts forderte von GEFA, den 33. IFEF-Kongreß auszurichten. Dies hat naturgemäß unsere Arbeit während des ganzen Jahres beeinflußt. Um besser vergleichen zu können, halten wir uns trotzdem an die gewohnte Einteilung.

1. Organisatorisches

1.1 Mitgliederstand

GEFA hat im Jahre 1981 an IFEF 819 Beiträge gezahlt. Mithin sind wir dort weiterhin durch 5 Delegierte vertreten. Zu Anfang 1981 hatten wir 495 Einzelmitglieder, woraus hervorgeht, daß der Mitgliederzuwachs aus der Werbekampagne 1979 aufgezehrt ist. Jedoch ist andererseits festzustellen, daß einzelne Mitglieder, denen wir besonders danken, immer wieder für frisches Blut sorgen.

1.2 Mitarbeiter

Keine Änderungen. Der Arbeitsausschuß kam mit allen Beauftragten in Oberkirch (Jahresversammlung) und Anfang April in Frankfurt zusammen.

1.3 Kurse

Alljährlich werden 6 bis 8 Kurse durchgeführt. Hier muß unbedingt darauf geachtet werden, daß die Kursteilnehmer bei GEFA Mitglied werden und daß ihre Betreuung gesichert wird. Damit wäre ein

dauerndes leichtes Wachstum der Vereinigung zu erwarten.

2. Mitarbeit in IFEF

Der 33. IFEF-Kongreß fand statt vom 15. bis 21.5. 1981 in Regensburg mit 518 gemeldeten Teilnehmern aus 18 Ländern. Wir übernahmen die Durchführung auf Bitten des BSW-Hauptvorstandes im Herbst 1978 für das Jahr 1981. Demzufolge begannen die Vorbereitungen Anfang 1979. Der Organisationsausschuß (LKK) wurde am 14.7. 1979 gebildet. Um die Aufwendungen niedrig zu halten, wurden nur 6 Vollsitzungen abgehalten, von denen 4 mit Sitzungen des Arbeitsausschusses gekoppelt wurden. Die zahlreichen örtlichen Besprechungen wurden überwiegend von nur 1 oder 2 Personen durchgeführt. Anmeldevordrucke und Werbemarken lagen bereits beim 32. Kongreß in America vor. Eigens für den Kongreß in Regensburg hat GEFA eine neue Fahne angeschafft, die für Innenräume bestimmt ist. Auf unseren Vorschlag hin hat auch die FISAIC eine Fahne geschaffen, die vor dem Kongreßgebäude in Regensburg erstmals wehte.

Der 33. Kongreß brachte einige Neuerungen, von denen hier erwähnt seien: Benennung der Verhandlungsräume nach verstorbenen Aktivisten von IFEF, Sendestation der Eisenbahner-Funkamateure, Uniformschau aus 13 Ländern (bisher nur einmal in Fulda), Info-Stand

in der Fußgängerzone, Literarischer Wettbewerb, Liederkassetten zum Mitsingen in den Autobussen. Außerdem Sonderpostamt mit Sonderstempel, Informationsdienst (3 Mitteilungsblätter). Den Text des Fachvortrages „Zug ohne Räder“ hat, wie seit Jahren üblich, der Dokumentationsdienst der DB übernommen.

Hier sei nochmals den BSW-Instanzen für ihre vielseitige Hilfe gedankt, ganz besonders dem Bezirksvorstand Nürnberg, den LKK-Mitgliedern, die lange Zeit hindurch die starke Belastung ertrugen, den Helfern, die wesentlich zum Gelingen des Kongresses beigetragen haben, den Mitwirkenden bei den Veranstaltungen und dem Zauberer Trixini, denen wir unvergeßliche Höhepunkte zu verdanken hatten.

Lassen wir noch die Schlußworte des Berichts aus dem „Internacia Fervojisto“ S. 39 folgen: „515 Teilnehmer aus 18 Ländern genossen diese beglückende Harmonie zwischen den Kongreßveranstaltungen und dem gastgebenden Lande. Wahrhaftig, hier hatten die Veranstalter wohl den Punkt erreicht, wo Kritik kaum noch Ansatzpunkte fand.“

3. Kontakte, Veranstaltungen

Die 24. Jahresversammlung fand vom 10. bis 12. Oktober 1980 in Oberkirch statt. 116 Teilnehmer, darunter 32 Ausländer aus 6 Ländern. Höhepunkt war das Theaterstück „Öffne die Tür“, gespielt von unseren polnischen Freunden.

Mehrere Mitglieder besuchten die internationale Skiwoche in Bohinj (YU), und einige nahmen sogar am Allgemeinen Weltkongreß in Brasilien teil. Die Zusammenarbeit mit den Gewerkschaften wurde aus Anlaß des Kongresses vertieft. Sie haben uns großzügig geholfen, ihre Vorsitzenden haben persönlich den Kongreß in der Internationalen Sprache begrüßt. Allen ein herzliches Dankeschön.

4. Information

„Bulteno“ erschien fünfmal mit 38 Seiten und 14 Abbildungen. In den DB-Amtsblättern erschienen 13, in der Tagespresse 57 Veröffentlichungen über unsere Tätigkeit, dgl. ein objektiver Bericht im Unternehmensorgan „Wir“. Über den Kongreß haben wir 131 Veröffentlichungen festgestellt, die sich wie folgt aufteilen:

in nationaler Sprache 33
in Esperanto 98

Im September 1981 hat die GdED 5 000 Flugblätter gedruckt, die hauptsächlich für die Werbung Jugendlicher gedacht sind.

5. Altenbetreuung

Die Ruheständler kamen zu ihrem üblichen Jahrestreffen am 5.9.1981 in Münster zusammen.

Emeritula renkontiĝo

La ĉi-jara emeritula renkontiĝo okazis je la 5a de Septembro 1981 en Münster (Westf). Estis 33 partoprenantoj, kiuj je la 11a horo kunvenis en la proksime ĉe la stacidomo situanta restoracio „International“. Bedaŭrinde ĉi-foje s-ino Kruse pro malsaneco ne povis ĉeesti. Pro tio la sekretario de GEFA salutis la ĉeestantojn en la nomo de nia asocio kaj laŭlegis la salutvortojn de la prezidanto Gießner, kiu bedaŭris, ke li ĵus dum tiu tempo feris. Jam baldaŭ regis agrabla etoso. Ĝustatempe ni ricevis bongustan tagmanĝaĵon. Poste ni faris malgrandan promenon tra la malnova parto de la urbo, tiuj, kiuj ne estis kapablaj tro multe iri, ne tiel longan ol la aliaj. Dum la promeno ni havis eĉ la okazon, admiri varbstandon de la Esperanto-grupo Münster kun sufiĉaj interesuloj. Post nia reveno ni ĝuis dum kaftrinkado kun manĝo de kuko denove la atmosferon de komuna kunesto.

Tro rapide pasis la tempo. La plej multaj ekveturis ĉirkaŭ la 16a horo. Ĉiuj estis dankemaj, ke la Federacia Fervoja Sociala Organizo ebligis ĉi-tiun kuneston por maljunaj homoj.

J. S.

Nürnberg / Lichtenfels

Unter der Leitung von Hardo Wendt begann am 6.10.81 im Unterrichtsraum des Bahnhofs Coburg ein Anfängerkursus mit 10 Teilnehmern. Die Teilnehmer treffen sich jeden Dienstag um 19.00 Uhr. Interessenten sind jederzeit herzlich willkommen.

57 artikolojn pri nia agado. La kongreso eĉ instigis la entreprenan organon „Wir“ objektive raporti pri ĝi. Pri la kongreso Regensburg aperis ĝis nun 131 publikigaĵoj,

el ili en nacia lingvo	
antaŭ la Kongreso	15
el ili en Esperanto	
antaŭ la Kongreso	61
el ili en nacia lingvo	
dum kaj post la Kongreso	18
el ili en Esperanto	
dum kaj post la Kongreso	37

precis 5 000 flugfoliojn, kies tekston ni estis parte transprenintaj el por junulara folio kaj adaptintaj al niaj cirkonstancoj. 2 000 el tiu kvanto la sindikato mem distribuis interne.

5. Emerituloj

Pro malsano de E. Kruse ĉi-foje gvidis J. Schrappe la renkontiĝon de la emerituloj la 5an de Septembro en Münster. Partoprenis 37 personoj. Laŭ ĝenerala deziro ni planas ankaŭ venontjare organizi tian renkontiĝon.

En Septembro 1981 la sindikato GdED

kompile Joachim Gießner

Jahresbericht (Auszug) über den Zeitraum von der 24. bis zur 25. Jahresversammlung (1980/81)

Vorbemerkung: Im vorjährigen Bericht hatten wir die 70jährige Vergangenheit unserer Vereinigung gestreift. Der Beginn des 8. Jahrzehnts forderte von GEFA, den 33. IFEF-Kongreß auszurichten. Dies hat naturgemäß unsere Arbeit während des ganzen Jahres beeinflußt. Um besser vergleichen zu können, halten wir uns trotzdem an die gewohnte Einteilung.

1. Organisatorisches

1.1 Mitgliederstand

GEFA hat im Jahre 1981 an IFEF 819 Beiträge gezahlt. Mithin sind wir dort weiterhin durch 5 Delegierte vertreten. Zu Anfang 1981 hatten wir 495 Einzelmitglieder, woraus hervorgeht, daß der Mitgliederzuwachs aus der Werbekampagne 1979 aufgezehrt ist. Jedoch ist andererseits festzustellen, daß einzelne Mitglieder, denen wir besonders danken, immer wieder für frisches Blut sorgen.

1.2 Mitarbeiter

Keine Änderungen. Der Arbeitsausschuß kam mit allen Beauftragten in Oberkirch (Jahresversammlung) und Anfang April in Frankfurt zusammen.

1.3 Kurse

Alljährlich werden 6 bis 8 Kurse durchgeführt. Hier muß unbedingt darauf geachtet werden, daß die Kursteilnehmer bei GEFA Mitglied werden und daß ihre Betreuung gesichert wird. Damit wäre ein

dauerndes leichtes Wachstum der Vereinigung zu erwarten.

2. Mitarbeit in IFEF

Der 33. IFEF-Kongreß fand statt vom 15. bis 21. 5. 1981 in Regensburg mit 518 gemeldeten Teilnehmern aus 18 Ländern. Wir übernahmen die Durchführung auf Bitten des BSW-Hauptvorstandes im Herbst 1978 für das Jahr 1981. Demzufolge begannen die Vorbereitungen Anfang 1979. Der Organisationsausschuß (LKK) wurde am 14. 7. 1979 gebildet. Um die Aufwendungen niedrig zu halten, wurden nur 6 Vollsitzungen abgehalten, von denen 4 mit Sitzungen des Arbeitsausschusses gekoppelt wurden. Die zahlreichen örtlichen Besprechungen wurden überwiegend von nur 1 oder 2 Personen durchgeführt. Anmeldevordrucke und Werbemarken lagen bereits beim 32. Kongreß in America vor. Eigens für den Kongreß in Regensburg hat GEFA eine neue Fahne angeschafft, die für Innenräume bestimmt ist. Auf unseren Vorschlag hin hat auch die FISAIC eine Fahne geschaffen, die vor dem Kongreßgebäude in Regensburg erstmals wehte.

Der 33. Kongreß brachte einige Neuerungen, von denen hier erwähnt seien: Benennung der Verhandlungsräume nach verstorbenen Aktivisten von IFEF, Sendestation der Eisenbahner-Funkamateure, Uniformschau aus 13 Ländern (bisher nur einmal in Fulda), Info-Stand

ke pli ol 200 infanoj trapasis tiun unikan lernejon. Ni helpu ebligi tion al pluraj centoj.

Sed baldaŭ disfalos la malnova kamioneto. La ŝtata subvencio restas egale malalta. La financa kaj materia helpo ne sufiĉas por nutri la infanojn kaj havigi lernilojn.

Nia evoluprojekto

Centoj el ni jam subtenis dum la pasintaj jaroj la laboron en Bona Espero, sed aktivecoj rapide laciĝas kaj ni ĉiuj ne volonte ĉiam denove petadas. Estas malagrabla por ni kaj ankaŭ por niaj protektantoj. Tion ni ekkonis, preparolis kaj agis:

Ek de la 24.3.1981 ekzistas la registrita societo: **Bona Espero e. V.**

La fondkunvenon en Telgte ĉeestis 14 membroj de la Esperanto-societoj Münster kaj Osnabrück krom lokaj subtenantoj. Ili akceptis kaj subskribis la statuton kaj elektis Margret Brandenburg, Henriette Otto, Ursula Schrapp kaj Adelheid Holtmann estraranoj. La finan-oficejo Münster agnoskis ĝian komun-utilecon.

Membroj pagas minimuman kotizon de 5,- gm.

Subtenantoj pagu laŭ siaj kapabloj. Membroj ricevas kopion de la statuto kaj almenaŭ du fojojn jare novaĵojn kaj aliajn informojn pri Bona Espero.

Membroj ricevas kvitancon por la financ-oficejo post la jarfina kalkulo, same subtenantoj, kiuj pagis pli ol 50,- gm dum la jaro. Por pli malgrandaj sumoj ni sendas kvitancon laŭ deziro.

Bankkonto: Sparda-Bank, Münster (Westf),
(BLZ 400 605 60)

Konto-nr. 900 826 Bona Espero

Al **Sparda-Bank** vi povas ankaŭ ĝiri per **poŝtĉekkonto 5732-465 Dortmund**

(favore al **Kto n-ro 900 826 Bona Espero**)

Aliĝilon petu ĉe: Margret Brandenburg,
Brinker Damm 23, **D-4404 Telgte**

Fervojaj Novaĵoj

El Soveta Unio:

Pluaj 6000 kilometroj estas elektrizataj

La Sovetaj Ŝtataj Fervojoj (SZD) aliigos dum la okdekaj jaroj pli ol sesmil kilometrojn da fervoj-linioj al elektra trakcio. Tio legeblas en raporto farita de la trafiko-ministro Pavlofskij ĉe la 26-a partio-kongreso de la Komunista Partio de Soveta Unio, en kiu publikigis la planadoj por la tempoperiodo ĝis la jaro 1985 kaj la perspektivoj ĝis 1990. Nuntempe 43 700 kilometroj, tio estas 30,8% de la entute 142 000 kilometrojn longa fervoja reto, estas elektrizitaj. Sed 53,6% de la transportoj jam estas farataj per elektra trakcio. Ĝis 1985 tiu procentaĵo estu altigota al 59,0%. En la okdekaj jaroj pluĝu la elektrizado de la transsibiria fervojo.

(El „Blickpunkt“ 9/81)

Tutmonda Esperantista Adresaro 1981

Ĝi havas formaton A6, ampleksas ĉ. 220 paĝojn, kaj enhavas ĉ. 2700 adresojn el ĉ. 60 ŝtatoj. Tre multaj personoj indikas, krom sia adreso, siajn aĝon, profesion, hobiajn, gradon de lingvosciado, deziron korespondi, kaj pretecon gastigi aliajn esperantistojn.

La prezo de TEA estas 6,60 DM + sendokostoj. Mendintoj, kiuj volas kunhelpi, ke ankaŭ esperantistoj loĝantaj en netranspavigovaj landoj ricevu TEA-ekzemplaron, estas petataj pagi la subtenan prezon de 7,50 DM + sendokostoj. La diferenco inter la normala kaj la subtena prezoj eniras nian fondaĵon „TEA por Netranspavigovaj Landoj“.

Pagmaniero: Pagu ĝire al poŝta ĉekkonto „H. Welger, Sonderkonto Info-Servo, n-ro 2979 08-600, Frankfurt“.

Essen

Klaus Benstein, BD Essen, wurde als neues Mitglied in unsere Vereinigung aufgenommen. B. hat schon am Lehrgang „Esperanto programita“ teilgenommen und beherrscht die Anfangsregeln der Internationalen Sprache. Herzlich willkommen und viel Freude beim weiteren Studium.

Redaktfino por n-ro 1/82 estas la 15. 1. 82.

Jubileo en Bremen – Meritkrucoj de GEA por Joachim Gießner kaj Elfriede Kruse

En Bremen okazis Nordgermana Esperanto-Tago (3./4. 10. 1981) sub aŭspicio de la Senataro pri klerigo, Horst von Hassel. NOGELO aranĝis sian Jarkunveno, sed aktuala okazo estis la 75-jara jubileo de la Esperanto-grupo Bremen, kies prezidanto Heinz-Dieter Hartig povis bonvenigi pli ol cent partoprenantojn, inter ili gastoj el Danlando, Nederlando kaj Belgio.

Kompreneble ankaŭ mia kara edzo ĉeestis, kaj li bonvolis kunveni min. Ni miris: en Sudgermanio pluvegis, sed alveninte en Bremen ni ekvidis tutklare brilantajn stelojn, kaj nia fidela „ŝoforo“, s-ro Eigendorf, kiu jam antaŭ jaroj tiel afable prizorgis nin, jam atendis en la stacia halo. Dum la veturado li informis nin pri la dumtagaj eventoj en Bremen: unue gazetkonferenco, kun multe da scivolaj ĵurnalistoj. Ili komence kontraŭstaris Esperanton, ĉar laŭ ili la „tuta mondo“ ja parolas la anglan kaj konklude la mondlingvo estas la angla. Nia ruza Heinz-Dieter Hartig tuj daŭrigis la ĵurnalistan intervjuon en la angla lingvo, (subtenata de d-ro Werner Bormann, Hellmut Grebe kaj Kurt Meyer), absolute neglektante la senesperajn okulojn de la „mondlingvo-parolantoj“, ĝis unu el la ĵurnalistoj helpokriante petis, ke oni daŭrigu la konferencon denove en la germana lingvo ... do 1 kontraŭ 0 por Esperanto. Kaj tiusenca estis ankaŭ la bona eĥo en la loka gazetaro, kiel ni eksciis unu semajnon poste: minimume 5 artikoloj aperis en 4 gazetoj.

La dua evento antaŭ nia alveno estis malfermo de ekspozicio sub la temo „Eblecoj per kaj kun Esperanto“, krome libroekspozicio (de s-ro Behrmann) kaj referato de Hellmut Grebe pri „Absichten und Ziele des Esperanto“. La salonego de „Stadtwaage“ estis plenplena (ĉ. 200 neesperantistoj), la posta diskutado estis vigla kaj la intervjuo kun ĉeestantaj belgaj, danaj kaj nederlandaj gastoj multe impresis, ne laste, ĉar Kurt Meyer lerte ĝin gvidis. Por ni do nur restis en tiu vespero la komuna kunestado en „Ratskeller“, kiun ni ĝuis en rondo de bonaj multjaraj ĝeamikoj.

La tago poste komencis per tiom abunda matenmanĝo, ke necesegis digesta marŝado. Eĉ tion antaŭvidis Heinz-Dieter Hartig (ĉu estis io, kion li ne antaŭvidis?) kaj do formiĝis du grupoj, kiuj admiris la urbdomon, la katedralon, Böttcher-

straton kun siaj specialaĵoj, fine esploris ege malvastajn sed pentrindajn stratetojn de Malnov-Bremeno. Dumvoje ni multe ridis, ĉar niaj gvidantoj estis ege spritaj kaj bonhumoraj. Post abunda tagmanĝo ni atendis aŭtobusojn por rondveturado tra urbo kaj haveno, kaj speciale la denaskaj „malbordanoj“ kiel mi ricevis pli kaj pli rondaj okuloj... fascinataj de ŝipoj grandaj kaj malgrandaj, arganoj, grupoj, multe da akvo kaj la „odoro de granda vasta mondo“.

Niaj aŭtobusoj iom malfruiĝis kaj tio kaŭzis, ke fervojista kunveno ne plu povis okazi kaj ke la NOGELanoj povis komenci sian jarkunvenon nur kun iom da prokrasto. Jen mi honte konfesas: ni ambaŭ, kvankam estraranoj de ROMOLO, ne povis kontraŭstari la tenton de la vere tre bela ĉirkaŭo sur la Werder-insulo, donis al NOGELO nian benon — kaj fuĝis. Intertempe estis venta kaj malvarma vetero. Ni frostis. Tamen tiun duopan duhoran promenadon inter aŭtunaj, tre zorge flegitaj ĝardenoj, veraj oazoj de beleco, ni neniam forgesos. Ĉu NOGELO pardonos nin?

Kulmino de la kunveno estis la festvespero okaze de la 75-jara jubileo de la Esperanto-grupo Bremen. Enkondukajn kaj bonvenigajn vortojn parolis dipl. inĝ. Kurt Meyer. Festprelegis Heinz-Dieter Hartig, prezentante koncizan sed bonegan superrigardon pri la 75-jara Esperantomovado en Bremen. Horst von Hassel, Senataro pri klerigo, honorigis nin per sia ĉeesto, trovis laŭdajn vortojn por Esperanto (kiujn mirinde bone kaj klare esperantigis Franz Kruse), kaj li afable jen kaj jen parolis kun Esperantistoj. Oni vere havis la impreson, ke li apogas kaj — se eble — subtenas Esperanton kaj li eĉ promesis eklerni ĝin post sia emeritiĝo ...

Venis la vico de salutoj. Hella Lanka parolis por NOGELO, Elsbeth Bormann por GEA. Ŝi surprizis GEFA-prezidanton

Joachim Gießner per meritkruco de GEa; kaj eĉ duan krucon ŝi kunportis por transdoni ĝin al Elfriede Kruse. Ŝi ricevis la krucon el la manoj de J. Gießner la 9an de Oktobro en la jarkunveno Offenbach. Jen elstrara rekono por la gravaj aktivecoj alportitaj de ambaŭ al la Esperanto-movado en Germanio. S-ro Gießner dankis elkore kaj samtempe salutis por GEFA. Sekvis salutvortoj de gastoj el Belgio (Lucien de Sutter), el Danlando (Irving Sørensen), el Nederlando (s-ino v. d. Zee, Leeuwarden, Menno Abbas el Groningen, s-ino v.d.Wal el Rotterdam kaj s-ro Posthumus nome de FERN). Nome de la Esperantistoj el la najbara Nienburg Günther Peek trovis belajn vortojn por Heinz-Dieter Hartig, kaj neniu el la salutantoj venis kun malplenaj manoj. Multege da donacoj Heinz-Dieter Hartig akceptis kun varmaj dankvortoj. Li atentigis pri la ampleksa librostando kaj pri ĵus eldonita ilustrita broŝureto „La Bremenaj Urbmuzikantoj“, tradukita de supera studkonsilisto Hellmut Grebe.

Iom post iom la festa programo transiris en gajan vesperon. Willi Korek, tre fama muzikisto ne nur en norda Germanio,

aktivigis eĉ maljunulojn per la „anasa danco“. Oni ne povas priskribi la etoson, sed ĉiu aktiva Esperantisto foje spertis tiun senton. Lacaj sed gajaj oni disiris liten.

La sekvantan tagon „estris“ d-ro Werner Bormann. Sub la devizo „Verbado kaj argumentado por Esperanto“ li gvidis lerte kaj sperte la diskutadon por kaj kontraŭ. La ĉeestantoj tre fervore kunagis kaj certe multaj el ni hejmenveturis kun novaj ideoj.

Heinz-Dieter Hartig estis suverena estro de tiu semajnfino. Apud li aktivis areto da helpantoj, kiuj forte subtenis lin. Sed kio estus Heinz-Dieter sen lia apudulino, la kara edzino Lisa? Mi observis ŝin, kiam ŝi tuttrankvile sidadis malantaŭ la „kaso“, enspezante same trankvile la kotizojn; kaj vespere – tre bele vestita – kvazaŭ juna virineto kunagis dum la „anasa danco“! Mi forte envias vin, Lisa! Ĉu unu virino al alia povas diri pli grandan komplimenton?

Elisabeth Ritterspach

Informa Fakto de IFEF

Nuntempe „informado estas ĉio“, ankaŭ por la Esperanto-movado. Por ĝi eĉ des pli, ĉar ĝi ne disponas pri la necesaj monrimedoj, por povi utiligi al si la amas-komunikilojn. Pro tio la IFEF-estraro cerbumis, kiel oni povus plialtigi la informgradon en IFEF kaj pri IFEF per efika metodo.

Sekve en la 33a kongreso en Regensburg la IFEF-estraro lanĉis respektivan kongresproponon, kiun la komitato akceptis. Laŭ ĝi la antaŭa vicprezidanto de IFEF, s-ro W. v. Leeuwen (NL) fariĝis komisiito por informado. Liaj taskoj ĉefe estas

- a) kolekti informojn el ĉiuj landaj asocioj de IFEF kaj disvastigi ilin laŭ graveco kaj en IFEF kaj eksteren, do pere de naciaj lingvoj al la amas-komunikiloj,
- b) kolekti interesajn informojn ekstere de IFEF – ĉu el la cetera Esperanto-movado, ĉu el nacilingvaj revuoj – kaj disvastigi ilin en IFEF.

En ambaŭ kazoj la komisiito bezonas la helpon de la landaj asocioj. Pro tio en la laborkunsido de la 25a jarkunveno de

GEFA en Offenbach 10.10.81) kolego Erhard Herlitze estas elektita germana kunlaboranto por la nova informa fakto, kiu do fariĝu kvazaŭ „gazetara servo“.

Ĉiu, kiu povas disponigi ĝenerale kaj internacie interesajn informojn, bonvolu ilin tuj sciigi en konciza formo al kol. Herlitze (adreso ĉiam en Bulteno 1)

Gi

Jam aperis la dua eldono:

Einführungskurs Esperanto, eine lebendige Sprache

aranĝita kaj nun denove prilaborita de Heinz-Dieter Hartig, eldonita de GEFA.

Laŭ la origina metodo de la anglo Midgley, la aŭtoro uzas multajn geometriajn liniojn kaj figurojn por gvidi la pensojn de la lernanto, ekzemple de persona pronomo al grupo de verboj, de tie al grupo de prepozicioj kaj fine al grupo de substantivoj. Kvazaŭ aŭtomate oni elektas unu vorton el ĉiu grupo – kaj jam havas kompletan frazon. Tio ebligas ankaŭ humuraĵojn: „Ĉu ŝi banas en seĝo?“ – „Ĉu la ronda tablo estas

inteligenta?" — „Ili veturas ĉirkaŭ dom-
mastrino.“

Aliloke kanono estas uzata por demonstri
—onta, —anta, —inta.

La aŭtoro volas veki la eltrovemon de la
lernanto, li divenu mem la signifon de
„preskaŭ kompreneblaj“ vortoj; nur por
kontrolado servu la vortolistoj. Li
eksperimentu per la vortoj, li fariĝu
ĵonglisto de prefiksoj, sufiksoj kaj afiksoj.
Kunpensadi ĉie necesas, postbabili ne
sufiĉas. Bona metodo por sprituloj, eble
ne laŭ ĉies gusto. Ĉu hazardo, ke inter
la unuaj adjektivoj troviĝas jam
„inteligenta“?

Ĉu la dua eldono diferenciĝas de la unua?
Jes, certe. La unua nombris 36 paĝojn,
la dua 52, sed fakte ambaŭ havas,
tutegale, 56 paĝojn: kelkaj paĝoj ne
ricevis numerojn, precipe en la unua
eldono. — La tekstoj sur la paĝoj estas
optike pli bone disdividitaj, gramatikaj
klarigoj multloke estas pliprecizigitaj,
ĉiuj ekzercoj, eĉ ties unuopaj frazoj,
ricevis numerojn. La vortolistoj estas
pliampleksigitaj.

Uzu la libron por viaj kursoj — mendu
ĝin ĉe GEFA-sekretario Schrapp.
Prezo 6,— DM. Ĉar la aŭtoro disponigis
sian verkon sen ia honorario—plene
profitas la GEFA-kaso! Ankaŭ la daŭriga
libreto „Konversacia kurso“ tie estas
havebla.

Ritt

Das Lehrbuch

Esperanto — eine lebendige Sprache

ist in 2. neu bearbeiteter Auflage
erschienen.

Wie bisher ist das Lehrbuch so gestaltet,
daß das Erlernen der internationalen
Sprache zum Vergnügen wird. Außerdem
ist lobend hervorzuheben, daß die Wort-
listen ergänzt und einzelne Hinweise
hinzugefügt worden sind. Es kann sowohl
für den Gebrauch in Kursen als auch im
Selbstunterricht empfohlen werden.
Der Bezugspreis beträgt 6,— DM
zuzüglich evtl. anfallender Versandkosten.

Bestellungen werden erbeten an das
GEFA-Sekretariat:

**Joachim Schrapp
Schmittingheide 17 d
4400 Münster (Westf)**

oder als EDS an BAmtn a.D. Schrapp,
DB-Schule 4400 Münster (Westf).

J. S.

Esperanto en turismo

La urbo Frankfurt am Main konsentis la
presadon de plurkolora esperantlingva
faldprospekto, kiu titoliĝas „Frankfurt ĉe
pulso de l' mondo“. La tradukon
prizorgis s-ro Barnickel, la reviziadon
s-ro Ritterspach. La fervojista grupo
Frankfurt transprenis la disdonadon de
la tuta stoko. Ĉiu abonanto de tiu
BULTENO ricevos po unu faldfoliojn. Kiu
deziras pluajn ekzemplerojn, turnu sin
skribe al „s-ro Walter Ullmann,
ZVL 6500 Mainz, AA 5452“ indikante la
propran deĵoran adreson, al kiu estu
sendataj la faldfolioj. Se estas dezirata
la poŝta vojo, bv. aldoni la necesan
afrankon aŭ respondkupono(j)n. Pro la
skeptika sinteno de la
urbo Frankfurt estus utile sendi gratulojn
al „Amt für Fremdenverkehr, Kongreß-
wesen und Städtepartnerschaften,
Gutleutstr. 7—9, 6000 Frankfurt am Main“.

W. B.

„Mi sidas en atendejo de fervoja stacio . .“

Tiel komenciĝas la unua el la
Elektitaj Satiroj de Efraim Kiŝon

La 112-paĝa libreto kun titolpaĝa bildo
de la ridetanta aŭtoro ĵus aperis en
Germanio ĉe la eldonejo Bleicher,
D-7016 Gerlingen-Stuttgart
(ISBN 3-88350-502-1), prezo 14,80 DM.
Senriproĉa, klara Esperantotraduko de
Gerhard Ziegler (Osnabrück).
Mendebila per ĉiu librovendejo aŭ
libroservo laŭ la supraj indikoj.

Vojaĝkalendaro

27. 12. 81 — 3. 1. 82
25 Internacia Seminario de Germana
Esperanto-Junularo
sur Sensenstein apud Kassel.

28. 12. 81 — 2. 1. 82:
Budapest; 11-a Vintra Esperantista Ferio;
Budapeŝta Komitato de Hungara
Esperanto-Asocio, p. f. 153,
H-1443 Budapeŝt

Pentekoston 1982; 60a GEA-Kongreso en
Münster/Westfalen.

Nekrologoj

Ni perdis niajn membrojn

Heinrich Bolte † 30. 6. 81
Elma-Doch-Straße 19, 7140 Ludwigsburg
kaj

Siegfried Moser † 29. 7. 81
Zellerhornstr. 3, 7460 Balingen
ambaŭ el la distrikto Stuttgart.

Ankaŭ nia fidela membro

Emil Kauffer TBOI a. D.
mortis je la 12. 7. 81 en la aĝo de
sepdektri jaroj. Laste li laboris ĉe la
iama fervoja direkto Regensburg. Li
partoprenis la UK en München kaj
Varsovio.

Ni esprimas ĉi-kune niajn funebrajn
kunsentojn.

Nia estimata kolego

Johann Thelen en 5014 Kerpen,
mortis la 12. 7. 1981, 65-jaraĝa.

Kun li, speciale la grupo Kolonjo,
perdis fidelan kaj aktivan lingvoamikon.
Jam en junaj jaroj li esperantistiĝis kaj
li estis unu el la unuaj membroj ek de
la fondo de GEFA.

Li gvidis longtempe nian lokan
Esperanto-grupon en Horrem.

Dum nia GEFA-Kongreso 1963 en
Regensburg li sukcese ekzameniĝis kaj
partoprenis regionajn kunvenojn kaj
niajn jarkunvenojn.

Li havis multajn amikojn en- kaj
eksterlande.

Sincere ni esprimas nian kondolencon
al la vidvino kaj al la familio. Li restas
neforgesebla.

GEFA-estraro

El la grupoj

Frankfurt:

Am Samstag, 29. 8. 81, unternahm die
BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt zu-
sammen mit der Esperanto-societo
Frankfurt und der Europäischen Vereini-

gung der Eisenbahner (AEC) bei idealem
Wanderwetter eine Taunuswanderung.

Wir trafen uns gegen 10 h an der End-
station Hohemark der Straßenbahnlinie
U 3 (oberhalb von Oberursel) und gingen
leicht bergan Richtung Altkönig (797 m)
mit keltischer Wallanlage, hielten uns dann
am Berghang entlang Richtung Falkenstein
(bei Königstein) um dann talwärts in die
sehr reizvoll gelegenen, eine noch
ursprüngliche Taunuslandschaft darstellenden
Hühnerbergwiesen einzubiegen.
Von hier aus näherten wir uns durch
spätsommerliche Fluren und sich schon
herbstlich verfärbende Waldungen dem
Tagesziel.

In der Anlage des Kleintierzuchtvereins
Steinbach/Taunus, wo wir gegen 15 h
eintrafen, empfing uns der appetitliche
Duft von Gegrilltem. Der Keller des
Vereinsheims bot uns vielfältige Getränke
zur Erfrischung. Mit frohen Liedern zu
Akkordeon und Gitarre verflohen die
Stunden.

Lob und Anerkennung unserem ältesten
Teilnehmer (77 Jahre) und unserem
„Benjamin“ mit 4 Jahren.

Mit der Hoffnung auf Wiederholung auch
solch gemeinsamer, geselliger Veran-
staltungen sagten wir „ĝis revido“!

Mit der AEC Frankfurt pflegen wir hier
in unserem Bereich guten Kontakt, vor
allem tragen wir mittels Esperanto zu den
internationalen Beziehungen der AEC bei.
Im übrigen besteht seit Sommer dieses
Jahres ein internationaler AEC-Beschluß,
bei den AEC-Landessektionen Esperanto-
Kurse einzuführen. Hier sind die IFEF-
Landesverbände und auch GEFA zur
Mitarbeit aufgerufen.

Europäische Vereinigung der Eisenbahner (AEC)

Vom 1. bis 4. 10. 1981 fanden in
Königstein/Taunus die jährlich von der
AEC in einem anderen Land veranstal-
teten Europäischen Tage statt. 450 Kollegen
aus 4 Ländern Europas trafen sich zu
der überwiegend mit geselligem und
touristischem Programm ausgestatteten
Tagung zur Pflege persönlicher Kontakte
im Sinne des europäischen Gedankens.

Unter den Teilnehmern befanden sich
auch esperanto-sprechende Kollegen aus

Belgien, Italien, Österreich und der Bundesrepublik.

Mitglieder der BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt und der Esperanto-societo Frankfurt wirkten bei der Vorbereitung und Durchführung der Veranstaltung mit.

Besonders Herr Dr. Ortwin Brodt, ein namhafter Esperantist, sorgte als Dolmetscher für französisch, italienisch und spanisch zur Verringerung der Sprachschwierigkeiten. In seinem Abschiedswort sagte er: „Ĉiu lernu Esperanton, kaj mi estas superflua.“



Vintro en Germanujo

Paca Nokt', sankta hor' — Stille Nacht..“

1. Paca nokt', sankta hor',
malkviet' foras for.
Nur maldormas la sankta par'.
Knabo eta kun bukla harar'
dormu en ĉiela trankvil'.

2. Paca nokt',sankta hor',
paŝtistar' en ador'.
Tra l'anĝela haleluja

al la mond' sonegas ja:
„Venis Krist' la savant'.“

3. Paca nokt', sankta hor',
dia fil', via kor'
donas amon dian sen fin',
de l' malbon' vi savis ja nin,
Krist' per via naskiĝ'.

tradukis: Joachim Gießner

**Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston
kaj sukcesplenan Novan Jaron.**